



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 2 1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Ĉefredaktoro: *Johan Hammond Rosbach*

3-a periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

La Universala Deklaracio

El ĉiuj dokumentoj, kiuj reflektas la longan historion de la lukto por emancipiĝo de la Homo el la ĉenoj de sklaveco, servuteco, politikaj kaj aliaj premoj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj prezentas la kulminon ĝis nun konkeritan en kadroj mondaj.

Tiu ĉi ĉarto de liberecoj kaj rajtoj konsistas el Solena Enkonduko kaj teksto de tridek artikoloj. Kvankam la teksto mem de la Deklaracio ne estas formale subdividita, tamen en ĝi estas distingeblaj tri partoj. La unua (art. 1—21) proklamas la jam klasikajn rajtojn kaj liberecojn, bazitajn ĉefe sur la grandaj principoj de la Franca Revolucio: libereco, egaleco, frateco. La dua parto (art. 22—27) difinas la novajn, ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn. La lastaj tri artikoloj, nomataj ankaŭ tegmento-artikoloj, ĉar ili iamaniere kovras la tutan Deklaracion, formas la trian parton, kiu entenas kelkajn regulojn pri ĝiaj signifo kaj interpretado.

El formale-jura vidpunkto la Universala Deklaracio havas karakteron de rekomendo kaj kiel tia ĝi ne estas deviga. Tamen, — kiel la subskribinto klopodis prui en la libro *Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo* kaj ankaŭ en studo speciale verkita por U.N.E.S.C.O. — ĝia enhavo

estas deviga kaj, efektive, en la lastaj jaroj ĝi estis ĉiam pli alvokata antaŭ kortumoj kaj tribunaloj. Tio, kompreneble, neniel signifas, ke ĉiuj proklamitaj rajtoj kaj liberecoj estis ĉiam kaj ĉie observataj, bedaŭrinde, tro ofte ili ankoraŭ estas piedpremataj. Sed, malobservo de kiu ajn jura preskribo ne forprenas de ĝi la juran kvaliton.

Senkonsidere al tiu aspekto, la Universala Deklaracio havas grandegan moralan valoron. En ĝi estas rekonita la esenca egaleco de ĉiuj homoj kaj difinitaj iliaj rajtoj en ĉiuj partoj de la terĝlobo sen kia ajn diskriminacio. Tial ĝi simbolas la tuthomecon kaj universalalecon de la mondo, kiu apartenas al la Homo super ĉiuj landlimoj, haŭtkoloroj, lingvoj kaj konvinkoj. Por milionaj amasoj kaj por ĉiuj vere intelektaj elitoj, konsiderantaj la homon antaŭ ĉio Homo, la Universala Deklaracio estas unu el la potencaj instrumentoj por la iom-post-ioma, paciencia kaj malfacila konstruado de la nova mondo de plenaj egaleco, libereco kaj justeco, en kiu la feliĉo de la tuto baziĝos sur la feliĉo de ĉiuj unuopuloj, kaj tiu de la individuo rezultos el la feliĉo de la tuto.

Prof. D-ro Ivo Lapenna.

JAROJ SUR TERO

Lakshimiswar Sinha prezentas siajn memorojn en interesa libro.

Legu la recenzon en n-ro 9/10 - 1967!

Riĉe ilustrita.

Bindita kr. 28,00. Broŝurita kr. 21,00.

Aldonu 10 % por sendkostoj!

ELDONEJO ESPERANTO,
Boks 942, Oslo 1

Por novuloj kaj lernemuloj

Cirkaŭ la mondon kun la verda stelo (J. R. Scherer)

Red.: H. Fridén

Darĝilingo.

Kiam en la somero la varmeĝo en Kalkutta ne plu estas eltenebla, la eŭropanoj rifuĝas al Darĝilingo (Darjeeling), 600 km norde, en la alta antaŭmontaro de la Himalajo. Mi ne suferis pro varmeĝo, sed Darĝilingo estas vidinda eĉ en la malvarma februaro.

De Kalkutta mi ekveturis vespere. La vagonaro unue rapidis tra la ebenaĵo de Bengalio. Post bona dormo kaj varmiga matenmanĝo mi plu veturis en eta montvagonaro. Malrapide supren dum 60 kilometroj sur mallarĝaj kaj krutaj reloj, farante multajn kurbojn, cirklojn kaj zigzagojn. Unue tra prarabaroj, kie hejmas la tigroj. Poste tra senfinaj teoplantejoj, kie kreskas jare 400 000 000 funtoj da teo. Rapide profundiga la valoj. Falas la temperaturo. Plivastiga la mirinda panoramo. Okazaj vilaĝoj, kie vivas homoj kun mongolaj vizaĝoj. Fine, tagmeze, post ses-hora veturo, alveno en Darĝilingo, la urbo, de kie ekiras la grandaj ekspedicioj al la montoj Everesto kaj Kinĉinganga (Kinĉinjunga).

Vortoj:

varm-eg-o, hete
ne plu, ikke mer
el-ten-obl-a, utholdelig (utholdsmulig)
rifuĝas, tar sin tilflukt til

antaŭ-mont-ar-o, for-fjellheim, forfjell
(fjellkjede som er foran)
suferi, lide
vid-ind-a, se-verdig
eĉ, endog
ek-veturi, avreise, starte, kjøre avgårde
eben-aĵ-o, slette-landet
varm-ig-a, varmende (varm-gjørende)
maten-manĝo, morgen-mat
mont-vagon-ar-o, fjell-tog
supre-n, oppover
mal-larĝa, smal
kruta, steil, bratt
reloj, skinner (rels, railway)
kurbo, kurve
unu-e, først
pra-arb-ar-o, ur-skog
hejmo, ha sitt hjem
kreski, vokse
jar-e, årlig
funto, pund
profund-ig-i, dypne, bli dyp
pli-vast-igi, utvide seg, bli videre
mir-ind-a, under-full, vidunderlig
okaza, tilfeldig
vilaĝo, landsby
vizaĝo, ansikt
tag-meze, ved middagstid
veturo, reise
ek-iri, starte
La Himalaj-o, Himalaya, fjellene
(som et begrep)
Mont-Everesto, Mt. Everest

Helsingør

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.—28. de julio en la internacia altlernejo (tute moderna) de Helsingør, Danlando. Venu por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

NB. *Aŭtunaj* feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ, (13.—19. de oktobro) ĉe Århus, Danlando. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20-a en la monato antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

Internacia Jaro de Homaj Rajtoj

La Statuto de UEA postulas respekton por la Homaj Rajtoj. Nun UEA instigas al ni ĉiuj celebri la 20-an datrevenon de la Deklaracio de Homaj Rajtoj. La jubilea tago estas la 10-a de oktobro 1968, do ni ankoraŭ havas tempon por nia agado. La plano de UEA por 1968 unuavice antaŭvidas intensan esploron kaj informadon pri la lingva diskriminacio en ligo kun la Homaj Rajtoj. UEA eldonis broŝureton kun la tuta teksto de la Deklaracio, kiun oni povas mendi ĉe UEA, nur pagante sendkostojn (2 int.resp.kup. por 1 ĝis 25 ekz.). Cetere ni publikigas en ĉi tiu numero de nia gazeto la tutan Deklaracion, kiun devas koni ĉiu esperantisto. Kaj ni revenos poste al aliaj punktoj de la Internacia Jaro de Homaj Rajtoj.

INFORMOJ DE LA EKZAMENA KOMISIONO

Ordinaraĵ printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Junio 1968. Instruistaj ekzamenoj oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Kom-

siono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Majo*. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj.
OSLO: Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1. Poŝtĝirokonto 100.34.
BERGEN: S.ro Kjell Offerdal, Sv. Hjetlands vei 6 B, Bergen.
HAUGESUND: S.ro Olav Thormodsen, Boks 59, Haugesund.
SARPSBORG: S.ro Johan Hammond Rosbach, Huldervn. 17 B, Sarpsborg.
SAUDA: S.ino Elna Matland, Brekkevn. 50, Sauda.
TROMSØ: S.ro Arne Høgseth, Høgstua, Postboks 1025, Tromsdalen.
TRONDHEJMO: S.ro Birger Nordstrand, Munkegt. 1, Trondhejmo.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Støp-Bowitz
prezidanto.

Donacoj al la kontorfondaĵo 1967.

H. Danielsen kr. 200,00

Donacoj al la kontorfondaĵo 1968.

R. Berli kr. 10,00
G. Ringstad » 10,00
O. Rygg » 100,00
K. Gustavsen » 50,00
S. Korstvedt » 30,00
Eva-Britt Hansen » 10,00
T. Andersen » 10,00
C. S. B. » 10,00

kr. 230,00

Donacoj al la propaganda fondaĵo 1968.

K. Gustavsen kr. 550,00
I. Dahl » 2,50

kr. 552,50

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

SCIIGOJ DE N.E.L.

Stipendio por ekzamenaj kandidatoj.
La Liga Estraro decidis starigi stipendion por junula membro, kiu en Junio 1968 plenumos ekzamenon de Esperanto (elementan aŭ superan). La stipendio kovros kotizon kaj restadon ĉe la somera kurso en Helsingo kaj parton de la vojaĝkostoj. Pliaj detaloj sekvos.

La norveglingva eldono de «Vivo de Zamenhof». Ni memorigas pri tio ke N.E.L. transprenis la reststokon de tiu grava, valora kaj interesa libro tre malmultekoste, tiel ke ni povas vendi ĝin por nur po kr. 3,00. La stoko tamen ligas grandan parton de nia modesta kapitalo, kaj aliflanke la libroj faros utilon nur kiam ili estos disvenditaj! Tial ni admonas la membrojn amase aĉeti de ni la libron, kiu estos taŭga donaco al viaj amikoj kaj konatoj. La kluboj povas kolekti mendojn de la membroj kaj sendi kune por ŝpari afrankon.

Taskotabelo por la kluboj. — *Marto.*
Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiu ankoraŭ ne pagis la kotizon.

La Liga Estraro.

AVERTO

La ĵus proklamita ĉeĥoslovaka nova poŝtmarko kun Esperantoteksto efektive estas fuŝaĵo. Ĝi estas presita en folietoj de po 4 markoj: du markoj supre, sub ili «kuponon», kaj sub ĝi du pliaj markoj. La Esperantoteksto ne troviĝas sur la poŝtmarko, sed nur sur la senvalora kupono. La afranka valoro de unu marko estas ĉ. kr. 5 (= n. kr. 5), sed aĉetante folion (por ricevi ankaŭ la kupongon) oni devas pagi ne 20, sed 50 ĉ. kr.! La tuta afero evidente estas nura spekulacio flanke de la ĉeĥoslovaka poŝto je la aĉetemo de la filatelistoj.

Hans Kristiansen:

PRINTEMPO ĈE LA KATEDRO

Katedro. Ho, kia dezerta ebena.

Katedro en suno.

Ankoraŭ pli terura dezerto.

Kruela estas la senviva regiono,

kaj la nuda, sentsenta okulo de l'inkujo.

Kaj nenion por sensoifigi min,

nek trinkaĵon por miaj soifaj infanoj.

Nur plenpoŝo da kraketaj paperfloroj,

la velkaj paperbantoj de prepozicioj.

Mi tenas ilin antaŭ miaj infanoj

kun febra entuziasmo de devo,

tenas ilin dense antaŭ iliaj vizaĝoj,

la kamuflitaj ŝtaldratoj pikas iliajn nazojn,

etendas ilin senespere kaj krias ordone: flaru!

Sentu kiel delikate kaj freŝe ili odoras

nun dum proksimas tempo de ekzameno.

Katedro en suno.

Ho, vento printempa. Envenu, envenu!

Rulu verdan tapiŝon super la plankon

kaj petu viajn nimfojn danci.

Metu freŝan lilion en mian inkujon.

Metu konkon sur tiun duran ebenon

kaj lasu min dormi kun brako subvange.

Trad: EAH

Norda Prismo komunikas

Post la bedaŭrinda morto de nia ĉefredaktoro d-ro Ferenc *Szilágyi*, la provizoran redakton transprenis s-ino Roza Szilágyi, Döbelnsgatan 66, Borås, Svedujo. Redakcio sekretario estas M. Groth, Brøndbyøster torv 6, Hvidovre, Danujo. Kiel kunredaktoroj daŭre funkcias s-roj B. Ragnarsson (Islando), J. H. Rosbach (Norvegujo), V. Setälä (Finnlando) kaj P. Thorsen (Danujo).

Post necesa reorganizo plej baldaŭ aperos el Danujo *Memora numero* pri Ferenc Szilágyi; kun la numero estos la oficiala dana publikajo «Danio en bildoj». Neabonantoj povas mendi per alsendo de 5 int. respond-

UNESKO- novaĵoj

KONFERENCO PRI DULINGVISMO EL KANADO

En la plimulto da landoj de la mondo estas pli ol unu vaste uzataj lingvoj. Malgraŭ tio, la pli grandan parton da laboro pri dulingvismo faris unuopaj sciencistoj, izolate, sen internacia komparo.

Konsidere al tio, la organiza komitato de la Internacia Seminario pri Dulingvismo, kiu okazis antaŭnelonge en Moncton, New Brunswick, sub aŭspicio de la Kanada Nacia Komisiono por Unesko, decidis, ke plej valora estus studo interfaka kaj internacia. Tial troviĝis inter la 90 personoj el 18 landoj, kiuj partoprenis, lingvistoj, psikologoj, sociologoj, demografoj kaj aliaj fakuloj. La ses ĉefaj studoj komisiitaj por la Seminario kaj la koncernaj diskutoj aperos en plena raporto post nelonge.

JUGOSLAVIO SUBSKRIBIS KONVEN- CIOJN PRI HOMAJ RAJTOJ

Jugoslavio fariĝis la 14-a ŝtato, kiu ĝis nun subskribis la du Konvenciojn de Unuiĝintaj Nacioj pri Homaj Rajtoj, nome pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj.

INDUSTRIA FORTO EL VULKANO

Eksperimenta fabriko starigota sur la insulo Lanzarote en Kanarioj, Hispanujo, uzos kiel sian fonton de energio la t.n. «Fajromonton».

CENTJARO DE WLADYSLAW REYMONT

Oni celebris ĵus la centjaran datrevenon de la naskiĝo de unu el la plej grandaj polaj verkistoj, Wladyslaw Reymont (1867—1925), kiu en 1924 ricevis la Nobel-premion por literaturo. Liaj plej gravaj verkoj estis

kuponoj aŭ 7 steloj ĉe la administranto, E. J. Frost, Ved Fortunen 16, Lyngby, Danujo (ĝirkonto 90 555).

AVERTO: Ne plu sendu ion por Norda Prismo al ĝia iama administranto kaj konsilanto s-ro L. Åberg, Skövde, Svedujo.

romanoj: «La aktorino», «La lando promesita», «La jaro 1794» kaj lia ĉefverko «La kamparanoj».

En Esperanta traduko aperis pluraj noveloj kaj rakontoj de Reymont: «Ave Patria, morituri te salutant» (tr. Leono Zamenhof), «La lasta» kaj «En fumejo de l'opio» (ambaŭ tr. Kabe) kaj «El la konstituciaj tagoj».

(Lau Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

LA PARTICIPA PRO- BLEMO NESOLVITA

Libera Akademia Rondo (grupo da akademianoj reprezentanta la tempnan uzadon de la participoj) deklaras, kaŭze de la akademiana komunikaĵo pri kvar pasivaj testofrazoj, ke la interpretoj signifitaj «A» entute ne estas konformigeblaj kun la tempaj indikoj en la 6-a § de la Fundamenta Gramatiko. La rezulto de la enketo tial devas esti konsiderata nur kiel opiniesprimo, kiu ne povas ligi la unuopan esperantiston en lia uzado de la participoj. Kiel provo solvi la tiel longe diskutatan demandon la kvar izolitaj frazoj (nezamenhofaj kaj eksterfundamentaj) estas klare nesufiĉaj. Evidente la estraro faris tro vastajn konkludojn el la voĉdonrezulto. En tia situacio, L.A.R. volas komuniki sian opinion, ke nenio malpermesas al esperantisto daŭre uzi la participojn kun tempa valoro, kiel instruas la zamenhofa regulo. La Fundamento ne estas ŝanĝebla per enketo, eĉ inter akademianoj.

Kun plej samideanaj salutoj,
via
Ebbe Vilborg
Sekr. de L.A.R.




FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kaldbakkstubben 22,
Oslo 9

VETURADO DE VETERANTRAJNOJ



Veterantrajno en Krøderen stacio la 11an de septembro 1966.

Ĉu vi povas memori de viaj infanaj tagoj, ke vi staris en la stacio, aŭ sur la korto, rigardante la preterpasantan trajnon?

La vaporlokomotivo kun sia alta kaj stranga fumtubo, la pasaĝervagonoj kun apert-platformoj, tektonpanelo, brilanta latuno, pluŝkovritaj sofoj kaj olelampoj, apelaciis al la fantazio.

Nuntempe tiuj veturiloj anstataŭiĝis per multe pli rapidveturantaj lokomotivoj, kaj anstataŭ esti movigataj per vaporo, ili aŭ moviĝas per elektra forto, aŭ per dizelmotoroj, kaj la vagonoj nun estas tegitaj per ŝtalo, la vojaĝantoj sidas en reguligeblaj apogseĝoj.

La sama grupo de fervojentuziasmuloj

kiuj prizorgas la somertrafikon laŭ la eĉŝ-pura resto de la iama Aurskog—Høland-fervojo de Sorumsand, nun konservas kelkajn el tiuj vagonoj kaj lokomotivoj, ili purigis kaj plibonigis ilin, kaj en kunlaboro kun Norvega Ŝtata Fervojo, ili veturigas veterantrajnon unu dimanĉon jare laŭ malofte uzataj flanklinioj. Se vi deziras ekonomie apogi la iniciaton vi povas pagi la jarkotizon kr. 25,00 al A/L Hølandsbanen, Postboks 31, Vindern, Oslo 3, tiam vi ricevas la norveglingvan membrogazeton «Tertitten», kiu informas pri la veteranfervojt-rafiko kaj pri fervojoj ĝenerale.

Laŭ informoj de A/L Hølandsbanen.

Per Johan Krogsstie.

ESPERANTISTA KULTURDOMO

KASTELO GRÉSILLON

Vi tre ofte aŭdis aŭ legis pri la kastelo de la esperantistoj, la Esperantista Kulturdomo en Francujo. Ni jen prezentas al vi ĉiujn informojn, kiuj povus interesi.

La Kastelo Grésillon, posedaĵo de la kooperativa societo «Kulturdomo de la Franclandaj Esperantistoj», situas 2 kilometrojn for de la urbeto Baugé, norde de la Loirevalo, proksimume ĉe la centro de triangulo, kies pintoj estus Angers (40 km.), Le Mans (60 km.), Tours (66 km.). Baugé estas facile alirebla per bonegaj vojoj, kaj atingebla de Parizo post 4-hora vojaĝo per vagonaro (Forirostacidomo en Parizo: Montparnasse; ŝanĝo de vagonaro en Le Mans). Venante de Suda aŭ Orienta Francujo oni atingas Saumur kaj, tie, uzas la vagonaron al Le Mans, ĉar Baugé situas inter tiuj du urboj

*

La tuta bieno entenas 17 hektarojn kun parko, herbejoj, kultivejoj, laĝeto, insuleto, banejo, infanĝardeno. La konstruaĵoj konsistas el la kastelo mem kaj malantaŭ ĝi duoncirklo de loĝejoj, remizoj, laborejoj.

Sur la teretaĝo troviĝas: granda enirhalo kun «butiko» kie estas aĉeteblaj poŝtkartoj, poŝtmarkoj, tabako, bonbonoj, memorajoj, ktp; biblioteko, oficejo, du manĝo-ĉambroj kaj la kuirejo, moderne ekipita.

Sur la unua kaj dua etaĝoj situas la ĉambroj: individuaj, familiaj (2—5 litaj), trilitaj kun apartigaj ligno-vandoj, komunaj. En ĉiuj ĉambroj la loĝantoj disponas pri lavotablo kun flua akvo. En pluraj ĉambroj oni ricevas ankaŭ varman akvon. Krome ekzistas kvar duŝejoj. La litoj (kelkaj dupersonaj) estas komfortaj.

La nutrado estas laŭ la franca maniero: matenmanĝo kun kafo, lakto, pano kaj butero; tag kaj vesper-manĝo simplaj sed aŭbundaj kun antaŭmanĝaĵo aŭ supo, viandajo, fiŝaĵo aŭ ovaĵo, legomoj, deserto. La trinkaĵoj (vino, biero, mineralaj akvoj, teo, kafo) estas krompagotaj per specialaj monkuponoj aĉeteblaj ĉe la «butiko».

Kompreneble la ĉefaj celoj de la Kulturdomo estas la instruoj kaj la praktikado de Esperanto kaj ankaŭ la *disponigo al la restadantoj* de ĉiuj eblaj kulturigi pere de Espe-

ranto precipe per valoraj prelegoj kaj aktivaĵoj. Sed antaŭ pluraj jaroj la administrantaro, konsiderante ke ĉiuj formoj de komuna laboro kaj distriĝo helpas al la interamikigo de la homoj, decidis proponi al ĉeestantoj: iniciadon al bindado de libroj, korbafarado, kaj kino-arto. Plie ĉiuj povas ankaŭ komune ludi sur la sportejoj kaj naĝi en la naĝejo. La infanoj disponas infanĝardenon kun balancoj kaj sablejo.

Krom la matenaj kaj posttagmezaj aktivaĵoj, la Kulturdomo prezentas, ofte helpata de la restadantoj, diversajn distraĵojn: paroladetojn, ludojn, dancojn folklorajn aŭ modernajn, lumbildojn kaj esperantoparolajn filmojn. Tiuj filmoj estas esperantigitaj en la Domo mem. La Kastelo malfermas sian pordon plurfoje en la jaro. Okaze de Kristnasko dum kelkaj tagoj kunvenas, laboremuloj kiuj okupiĝas pri la esperantigo de filmoj, reordigo de la materialo, inventaroj. Ili kune festas la unuan tagon de la nova jaro. La Paskaj Ferioj estas ĝenerale dediĉitaj al la junularo. Multaj francaj (kaj kelkaj eksterlandaj) gejunuloj tiuepoke lernas aŭ praktikas la universalan lingvon kaj aŭskultas prelegojn. Ili plejmulte estas estontaj geinstruistoj. Kompreneble samtempe partoprenas ankaŭ ne plu junaj esperantistoj.

De la komenciĝo de julio ĝis la mezo de septembro okazas kvar studperiodoj kun kursoj kaj prelegoj, multe vizitataj de francoj kaj eksterlandanoj.

La proksima ĉirkaŭaĵo de la kastelo estas alloga kun grandaj arbaroj kaj pitoreskaj vilaĝoj. Plie la Kulturdomo organizas ekskursojn al la plej vizitindaj lokoj: la famaj reĝaj kasteloj de la Loire-valo; la urboj Tours, Angers, Le Mans, Saumur; la bela zoologia ĝardeno de La Flèche. Multaj restadantoj ankaŭ vizitas la belan noktan spektaklon prezentitan en la kastelo de Le Lude, sur la bordo de la rivereto Loir.

Ĉiuj informoj estas haveblaj kontraŭ respondokupono ĉe:

ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Grésillon — 49 — BAUGÉ
(Maine-&Loire) — Francujo.

Lingvo kaj imitado

Daŭrigante la artikolon en n-ro 1, ni rigardu ĉifoje la manierojn de imitado kaj la limigojn de tiu imitado.

Plej ofte ni parolas nian Internacian Lingvon, ne pripensante, ke ĝuste tiun lingvon — la lingvon, kiun ni verŝajne parolas pli bone ol la lernitaj kaj studitaj naciaj lingvoj — ĝuste tiun lingvon ni uzas en tute alia kondiĉo ol la naciajn lingvojn. Estas bone tiel, ĉar tio nur montras, ke ni parolas Esperanton same nature kiel kiun ajn t.n. naturan lingvon.

Estas evidente, ke la parolata lingvo ekzistas antaŭ la skriba lingvo, kaj ke, tial, la skriba lingvo estas farita laŭ modelo de la parola. Lingvokreantoj, kiel Dante, Luther kaj Ivar Aasen, devis konscie pesi vortojn kaj parolturnojn por normigi la lingvon. Skriba lingvo bezonas normon kaj regulojn en multe pli alta grado ol parolata

Sveda jarkongreso

La Sveda Esperanto-Federacio jarkunvenos 1968 en Sundsvall. La jarkongreso okazos Pentekoste, 1—3 junio, en norda parto de Svedio dum la frua somero, kiam la naturo ekfloras, la tagoj estas longaj kaj la noktoj helaj. La gastiganta klubo, Amika Rondo, («40-jarulo»), atendas multajn anojn kaj mencias ke la kongreskotizo estas senpaga por eksterlandaj esperantistoj.

En la programo estos krom kongreslaboro ankaŭ diskutado, prelego, distraj programoj kaj ebleco partopreni rondveturon kaj ekskursojn.

Letermarkoj estas aĉeteblaj jam nun. Bonvolu sendi 3 int. rp. al Esperantokongresen 1968, Sudsvall.

ESPERANTISTA KULTURDOMO PASKAJ FERIOJ

(Alventago: 4-an de Aprilo — Forirtago: 11-an de Aprilo: Ses a Kultura Semajno organizita de U.F.E. kaj G.E.E.

Programo: Pliprofundigo de la lingvokonaj per teksto; pedagogia iniciato al instruado de la lingvo; kultura kaj arta aplikado de la lingvo; prelegoj.

Ekskurso: la 7-an de Aprilo.

De Pasko ĝis la fino de Julio estos eble akcepti grupojn eĉ ne-esperantistajn por pli malpli longaj periodoj.

lingvo. La regulojn kolektis kaj ordigis la gramatikistoj.

Gramatiko, do, efektive estas la regularo de la lingvo. Alivorte, la tasko de la gramatiko estas priskribi. Sed, kompreneble, ĉar la skriba lingvo bezonas regulojn, la gramatiko havas alian, duan, taskon: la gramatiko ankaŭ reguligas: ni obeu ĝin.

En nia ĉiutaga uzo de la lingvo, ni ne ĉiam tiel atente obeas. Ni kreas novajn formojn. Ekzemploj el la norvega lingvo pli bone ol io alia montras, kion mi celas. La verbo *tranci* estas en la norvega lingvo *skjære*, imperfekto: *skar* (do verbo el la tipo *synge* — *sang*, *treffe* — *traff*). Sed la tendenco en la norvega lingvo estas transiro, iom post iom, al verboj el la tipo *bore* — *borte* (ekz. *svømme* — *svam* nun estas *svømme* — *svømte*). Tial ni ofte aŭdas *skjære* — *skjerte* (anst. *skar*), kvankam tiu formo *skjerte* ne estas ĝusta laŭ la gramatiko. Tamen la formo *skjerte* certe gajnas, kaj oni ne povos plu diri, kiam la tuta popolo uzas ĝin, ke ĝi estas neĝusta.

En tiu maniero la parolata lingvo ĉiam influas al la skriba, kaj tiu proceso ne finis. Des pli ni bezonas regulojn kaj gramatikon. Iom post iom la parolata lingvo kolorigas la literaturon, eĉ eksterlandajn vortojn ni alprenas (kaj kial ne, se ni bezonas ilin?) — vi certe rimarkis, kiel ni ekuzis, post la milito, amason da anglaj vortoj (bag, shopping,) kaj esprimojn, kiujn ni norvegigis (sjekke opp, følge opp, det er opp til deg). Estas neebla afero forbalai tiajn vortojn — rezulte ni devas ilin adopti kaj adapti, kio estas sana proceso neevitebla. Kompreneble nun la lingvaj puristoj laŭte protestas, sed iliaj protestoj bedaŭrinde ne estas aŭdataj. Ankaŭ mi mem volonte protestus, ĉar antaŭ la milito ni ne havis, nek bezonis tiujn esprimojn.

Per la supraj vortoj mi verŝajne sufiĉe klare montris, kial la parolata lingvo devas esti pli libera, pli libera ol la skriba, kaj samtempe, kial la skriba lingvo devas esti pli konservativa ol la parola.

En Esperanto tiu proceso ne sammaniere okazas, kaj ne povas okazi. Neniam tuta popolo dum pli longa periodo parolas Esperante. (Tendencojn oni rimarkas dum la kongresoj, sed la periodo ĉiam estas tro mallonga por povi influu.) En Esperanto la

Esperanto en radio

Eŭropaj dissendoj

Ĉintage

- 15.30—16.00 Warszawa, 50.25 m, 42.11 m, 41.99 m, 31.50 m, 25.99 m, 25.42 m, 25.09 m. Adreso: Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa.
- 19.30—19.45 Budapeŝt, 240 m, 75.09 m, 48.10 m, 30.51 m, 25.19 m, 16.77 m, 13.83 m. Adreso: Radio Budapeŝt, Esperanto-disdendoj, Budapeŝt VII.

Dimanĉe

- 20.00—20.20 Roma, 50.08 m, 41.24 m, 30.90 m. Adreso: Radio Roma, Esperantofako, Casella postale 320, Roma.
- 23.30—23.55 Sofia, 49.42 m, 31.38 m.

Lunde

- 12.05—12.15 Bern, 75.28 m, 48.66 m, 31.46 m, 19.60 m, 13.94 m. Adreso: Svisa Radio, S.O.C., Bern - 16.
- 22.45—23.00 Valencia, 278 m, Adreso: La Voz de Levante, Valencia.

Merkrede

- 6.45—6.55 Gdansk, 230 m. Adreso: Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk, Polujo.
- 12.05—12.15 Bern. Kiel lunde.

skriba lingvo estas pura, sen difekta influado de malpli zorge parolata lingvo. Efektive, en Esperanto la plej grandan danĝeron reprezentas la tro vasta uzo de neologismoj — kaj nun mi pensas pri nenecesaj neologismoj. En ordinara proza teksto ni ne bezonas vortojn kiel *lanta* (malrapida), *kurta* (mallonga) ktp., la poetoj uzu ilin laŭplaĉe.

La mallonga instruado el ĉi tiuj multaj vortoj estas, ke en Esperanto la skriba lingvo influas al la parolata. Kaj ĝuste tiel devas esti en Esperanto.

Por lerni bonan Esperanton ni do simple imitadu — kaj ni imitadu la bonajn aŭtorojn. Ni legu literaturon, ni parkeru vortojn, ni ekuzu bonajn parolturnojn, ni lernu tutajn frazojn. Ĉu vi vidas alian vojon?

JHR.

Ĵaŭde

- 21.50—22.00 Bern, 75.28 m, 48.66 m, 31.46 m, 31.27 m, 25.25 m.
- 23.05—23.20 Zagreb, 264 m. Adreso: Radio Zagreb, Zagreb, Jugoslavio.
- 23.05—23.20 Beograd, 439 m, 48.78 m. Programo de Zagreb.

Vendrede

- 14.30—14.45 Wien, 203 m. Adreso: Radio Wien, Argentinierstrasse 30 a, Wien IV.

Sabate

- 21.50—22.00 Bern. Kiel ĵaŭde.

*

Aŭskultinte al Esperanta disaŭdigo, sendu ĉiam karton al la koncerna radiostacio. La stacioj Bern, Roma kaj Warszawa regule sendassenpagan programon al petantoj.

Novaj vojoj -

NOVAJ PROGRAMEROJ

La plej multaj Esperanto-kluboj en nia lando estas malgrandaj, tiel malgrandaj, ke ili samtempe povas esti taŭge grandaj studrondoj. Tial oni povas, kun multe da sukceso, instrui Esperanton en la ordinarij klubvesperoj, kaj — laŭ la ricevitaj informoj — tiel tre ofte okazas.

Instruado povas okazi laŭ multaj vojoj. Oni povas ortodokse legi paĝon en iu libro, traduki, klarigi novajn vortojn kaj gramatikajn problemojn. Mi volas diri nenion senhonorigan pri tiu metodo, kiu, dum jarcentoj, havigis scion al tiom da miloj, kaj kiu estas ankoraŭ hodiaŭ praktikata kun sukceso.

Alia afero estas, ke aliaj vojoj, aliaj metodoj, povas fari la instruadon pli interesa. Eble kelkaj klubanoj emas partopreni instruadon, kiu ne tro similas al la iama lernejo!

Bona regulo almenaŭ estas, ke oni instruu tiel, ke la lernantoj uzas la lernatan lingvon *mane, buŝe, okule kaj orele*.

En la klubo en Sarpsborg, *La Urso*, ni eksperimentis dum pluraj jaroj pri diversaj instrumetodoj, kaj ankaŭ pri malortodoksaj metodoj koncerne ekz. ellotadon kaj aliajn programerojn.

En ĉi tiu arikoletto mi ŝatus nur prezenti

du eblajn vojojn — bonvolu: vi povas ilin senpage ekuzi. Por diri la veron, tiuj du metodoj estas, ankaŭ ĉe ni, ankoraŭ en la beba stadio.

Elementa instruado: Sur la tabulo oni krete desegnas (aŭ, kompreneble, se oni ne havas tabulon: per karbo sur kartono) skize iun scenon, ekz. parkon kun kastelo, floroj, statuoj, vojetoj, herbo, arbo, homoj, pordoj, fenestroj, fumtubo; ĉielo, nuboj. Oni kompreneble procedu laŭ la nivelo de la lernantoj, sed estas evidente, ke oni povas, se temas pri ekz. gimnazianoj, jam en la unua leciono enkonduki pluralon kaj preteriton («kiu konstruis la palacon?») kaj akuzativon. Oni povas desegni *dum* la instruado, kio donas al la tuta programero pli da verovo, aŭ antaŭ la instruado, kio estas pli facila por la instruanto.

Ne kredu, ke la afero estas nun finita! Nun komenciĝas la vera laboro. Ĉar la skizo sur la tabulo estas nur simpligitaj konturoj — la simpligo donas superrigardon, eliminante necesajn, tro malfacilajn aŭ sintrudajn detalojn, kaj ankaŭ povas krei mikikajn situaciojn (kaj gaja rido estas esenca faktoro en sukcesa lernado/instruado). Ni nun prezentas *diapozitivon*, kiu montras *la saman scenon*: jen la parko, jen la palaço, la floroj, nuboj, homoj, arboj. La lernantoj instinkte elserĉas ĝuste la elementojn, kiujn li lernis, kaj ne atentis la necesajn detalojn, kiuj nun cetere kontribuas al plaĉa bildo — des pli plaĉa, ĉar ĝi ja estas multe pli bela ol la rapide farita skizo (neniu el ni estas desegnistoj!)

Eble oni elektu diapozitivon pri fremdaj lokoj. Por esperantisto tio estas tre facila afero. Ni simple skribas al Delegito en iu urbo, petante, ke li prizorgu diapozitivon (ne forgesu la pagon!) — kaj tiaj diapozitivaj estas efektive tre malmultekostaj instruiloj.

Studlaboro: Koncerne studlaboron oni povas en ankoraŭ multe pli alta grado allasii sian fantazion. Tamen — kial ne rezultigi el tiu laboro ne nur lingvajn sciojn ĉe la membroj, sed ankaŭ objekton, valoraĵon, kiu restos ankaŭ dum postaj jaroj, kaj kiuj povos ĝojigi niajn posteulojn? Antaŭ kelkaj jaroj ni aĉetis filmstriojn ĉe Statens Filmcentral kaj faris Esperantajn tekstojn, kiujn ni magnetofone registris. Tia filmo povos en venontaj jaroj esti bonvena programero. Nun alia ideo realiĝas: la klubanoj kreas *poŝtmarkan albumon* — *kun tekstoj!* En ĉiu kunveno la membroj kunportas po unu poŝt-

marko kun taŭga bildo (fama persono, besto, planto, urbo, artaĵo ktp.), kaj samtempe li prezentas kelklinian tekston leksikone koncizan pri tiu bildo. En la kunveno oni priparolas la tekston, korektas lingvajn erarojn, enmetas la poŝtmarkon en la albumon — kaj la aŭtoro de la teksto propramane enskribas ĝin en la albumo. Iom post iom tio fariĝos impona kaj interesa albumo. Kaj oni lernas ne nur nian lingvon (kiom da nekonsistaj vortoj estas bezonataj!), sed ankaŭ akiras sciojn pri multaj interesaj aferoj, kiujn oni sen tio neniam tuŝus.

Joban Hammond Rosbach.

RECENZOJ

*Duope ricevitajn librojn ni recenzas,
unuope ricevitajn mencias.*

BONA NOVELARO

Marjorie Boulton: Okuloj. Novelaro. Eld.: STAFETO, J. Régulo, La Laguna, Tenerife, 1967. 178 p., broŝ.

La ruĝa, moderna, kovrilo de Jan Schaap Jr. iel timigas, sed la nomo de Marjorie Boulton tiom promesas . . .

Prezento de la aŭtorino neniel necesas. Tamen ni ŝin konas ĉefe kiel poëtinon, kaj ĝuste en la poëzio ŝi kreis verkojn, kiuj restos veraj kolonoj de nia originala literaturo. Ŝi faris kiel la romia poëto, kiu diras pri si mem: «Exegi monumentum aere perennius»: «Mi starigis monumenton pli daŭran ol bronzo».

Sed ankaŭ en la teritorio de la prozo nia Boulton iom post iom rimarkigis — tion scias tre bone ĉiuj, kiuj okupiĝis pri la Belartaj Konkursoj. Drametojn kaj skeĉojn ŝi donis en la tre populara «Virino ĉe la landlimo».

Kaj jen noveloj.

Senhezite mi komencas la recenzon per rekomendo: Legu ĝin!

Pri la lingvo de Marjorie Boulton mi ne multon diros; ŝi ja regas Esperanton! Mi nur notis kun miro kaj intereso la vorton «viriniĝintino», kies dufoja «in» estas necesas, sed tre komprenebla kaj utila. Cetere la vorto mem estas vera kakofonio, niel sufiĉe ĉar-

ma por indiki . . . viriniĝintino! Kaj la vorton «knabamiko» (boy friend!) mi ne akceptas.

La enhavo? Tre ofte fantaziplenaj, eĉ neblaj okazaĵoj. Tio ne timigas fraŭlinon Boulton, kaj tio ankaŭ ne timigu la legonton. Ĉar efektive la prezento de la temo estas, por Marjorie Boulton, ne la plej esenca. Ŝi ĉiam havas mesaĝon al la leganto, kaj ĉiam saĝan mesaĝon, ĉiam ŝia sinteno estas komprenema, korvarma, homama. Do ni legas la libron ne nur kun intereso (ĉar ĝi estas kapte interesa!), sed ankaŭ kun ŝato kaj simpatio, kaj kun admiro pri la sperta scio, kion la aŭtorino montras koncerne la homan animon, la virseksan same kiel la inseksan.

Ĉiu bona novelo, ĉiu bona novelaro estas bonvena en nia literaturo, kaj ĉi tiu estas, kvankam formate modesta, granda novelaro.

Joban Hammond Rosbach.

LA MUZIKO DE VERA POETO

Hendrik Adamson: Vesperkanto. Poemaro. Eld.: STAFETO, J. Régulo, La Laguna, Tenerife, 1967. 132 p., broŝ.

De tempo al tempo oni renkontas la nomon Hendrik Adamson, se oni legas pri Esperanta literaturo. Sed oni efektive nur tro malmulte renkontas la poëton mem, lian verkon. Nun STAFETO eldonis, sub redakto de K. Kaloscaj, en la serio de Beletraj Kajejoj, kolekton de liaj poemoj, kun tre utila prezento de la simpatia poëto mem, verkita de lia samlandano Hilda Dresden.

La temoj de la poemoj estas diversaj, sed ĉiuj klare bildigas la kuraĝan, suferantan, profundaniman poëton, kiu kantas ne nur pri printempo kaj pri la kamparo dumsomere, sed ankaŭ pri la rando de la tombo.

En ĉiuj versoj estas la muziko de la vera poëto. Liaj rimoj estas riĉaj, cetere li ofte kontentiĝas je asonancoj, — kaj li ne timas onomatopeojn, antaŭ kiuj malpli kuraĝe memstara aŭtoro time retiriĝus. Li estas escepte konscia pri la elekto de ritmoj, tiel ke la elektita ritmo ĉiam ŝajnas la plej taŭga por la temo. Rimarkinde estas ankaŭ, kiel li regas la tre mallongliniajn poemojn el la tipo

Sen tragedi',
sen kora kriz'.
Luiza, nun ni
disiĝas sen ĝis

Kelkaj poemoj respegulas popolan poëzion kun karakterize revenantaj temfrazoj, kaj en la tuta libreto oni ĝuas la mirindan vokalarmonion.

Tie kaj tie mi vidas, ke iu (la poëto mem? la redaktinto?) iom reverke ŝanĝis vortojn, detalojn, — sed bedaŭrinde ne ĉiam kun brila sukceso: plej ofte la versoj estis pli bonaj en sia malnova formo!

La poëmo «Fruprintempo» bone ekzempligas lian arton:

Sur malaltaj juniperoj
inter grizaj tertuberoj
malsatante la paseroj
bekas el aĝustaj beroj.

Grize verdaj juniperoj,
grize brunaj tertuberoj,
grizaj ŝtonoj kaj paseroj,
grize nigraj aĝaj beroj.

Joban Hammond Rosbach.

FAKTOJ PRI SVEDUJO

Ĉe la sveda ambasadoro vi povas peti utilan folion nomitan Faktoj pri Svedujo, kiu estas eldonita de la Sveda Instituto por kultura intersaĝo kun eksterlando. La folio informas pri geografiaj faktoj, klimato, loĝantaro, konstitucio kaj parlamento, eksterlanda politiko kaj internacia kunlaboro, defendo, religio, naturrezoroj, ekonomio, industrio, terkulturo, eksterlanda komerco, publika financo, indikiloj de vivnivelo, salajroj, socia flego, edukado, kulturo. Germana kaj franca eldonoj aperis 1966, rusa kaj finna 1964, itala 1965 — kaj Esperanta 1967. La folion oni rajtas libere konsulti kaj uzi, sen mencio pri la fonto, por preparo de artikoloj ktp. Oni almenaŭ montru al la eldoninto, ke la eldono valoris la penon — cetere ni gratulas al la Sveda Instituto, ke ankaŭ ĝi nun montriĝis atenta pri la valoro de la Internacia Lingvo.

R.

*

Membroj de Esperantoklubo en Madrido deziras korespondi pri ĉiaj temoj, interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, leterojn. Diamanto Grupo de Esperanto, Dr. Espina, 34-bajo, Madrid 19, Hispanujo.

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*

ANTAŬKONSIDEROJ

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencan de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tio mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinaraj homoj,

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, Nun,

LA ĜENERALA ASEMBLEO proklamas

TIUN ĈI UNIVERSALAN DEKLARACION DE HOMAJ RAJTOJ kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan

* Akceptita kaj proklamita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de decembro 1948.

agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

Artikolo 1. Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencan, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2. Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3. Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4. Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; sklaveco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

Artikolo 5. Neniu suferu torturon aŭ kruecan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6. Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7. Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn instigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8. Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝoj.

Artikolo 9. Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.

Artikolo 10. Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11. (1) Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

(2) Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikibla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.

Artikolo 12. Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.

Artikolo 13. (1) Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.

(2) Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

Artikolo 14. (1) Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.

(2) Tiu rajto ne estas alvokibla en kazoj de persekutaj akuzoj malfalse levitaj pro nepolitikaj krimoj aŭ pro agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15. (1) Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.

(2) Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.

Artikolo 16. (1) Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacienco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne eksedziĝon.

(2) Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝontoj.

(3) La familo estas la natura kaj fundamenta grupunujo de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la Ŝtato.

Artikolo 17. (1) Ĉiu rajtas proprieti havigi, kaj sola kaj en asociiĝo kun aliaj.

(2) Al neniu estu arbitre forpenita lia proprieto.

Artikolo 18. Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

Artikolo 19. Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rime-

do kaj senkonsidere pri la landlimoj.

Artikolo 20. (1) Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo.

(2) Neniu estu devigita aparteni al asocio.

Artikolo 21. (1) Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.

(2) Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.

(3) La volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu volo estu esprimita per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaj proceduroj.

Artikolo 22. Ĉiu, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu Ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiu estas nepre necesaj por lia digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.

Artikolo 23. (1) Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.

(2) Ĉiu, sen ia ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salajron pro egala laboro.

(3) Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompenson, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementu, laŭnecese, aliaj rimedoj de socia protekto.

(4) Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

Artikolo 24. Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racion limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.

Artikolo 25. (1) Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.

(2) Patrineco kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.

Artikolo 26. (1) Ĉiu havas rajton je edukado. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj

Internaciaj kulturaj ferioj en Jugoslavio - Somero 1968 -

Cele al progresiva esperantigo de la gravaj turismaj lokoj, la Turisma sekcio de I.O.E. por Jugoslavio organizos ekde 1968 «internaciajn kulturajn feriojn» en: BLED, DUBROVNIK, POREC, PRIMOSTEN, ROVINJ kaj JABLIJAK. Tiuj ferilokoj troviĝas nepre inter la plej allogaj en Jugoslavio.

Provizora programo:

BLED /1.—15. VI. 1968/

internacia festivalo de pupoteatroj, vesperoj de kanzono, teatro, filmo kaj folkloro, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

DUBROVNIK /15.—30. VI. 1968/

internacia festivalo de foto-film amatoj, pupoteatra prezentaĵo, kanzonvespero, teatroprezentaĵoj, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

POREC /1.—14. VII. 1968/

internacia universitata arta festivalo, spektakloj donataj ĉefe de gestudentoj: teatrovesperoj, folklorvesperoj, amatoraj kaj tutvespera filmoj, balo, ekskursoj, ekspozicioj

pri studenta arto, kurso de Esperanto por komencantoj.

PRIMOSTEN /15.—28. VII. 1968/

internacia festivalo de teatro, folklorvespero, filmprezentado, amatorfilma vespero, kanzonvespero, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

ROVINJ /15.—30. VIII. 1968/

internacia festivalo de Esperanto-kanzono, folklorvespero, filmprezentado, teatra vespero, amatorfilma vespero, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

JABLIJAK /31. VIII.—15. IX. 1968/

rekontiĝo de montogrimpemuloj kaj naturamiko, kanzonvesperoj, filmvesperoj, teatrovesperoj, amatorfilmaj vesperoj, pupoteatra prezentado, folklorprezentado, ekskursoj, kurso de Esperanto por komencantoj.

Informojn pri la aranĝoj, aliĝilon kaj restad-mendilon bv. peti de: IOE-Turisma fako por Jugoslavio. Postfako 213, Zagreb, 2, JUGOSZLAVIO.

porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

(2) Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasoj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.

(3) Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

Artikolo 27. (1) Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturalan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencan progreson kaj ĝiajn fruktojn.

(2) Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.

Artikolo 28. Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj libe-

recoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.

Artikolo 29. (1) Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.

(2) En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.

(3) Tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en neniu okazo efektivegeblaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 30. Nenio en ĉi tiu Deklaracio estu interpretita kiel implico, ke iu ajn ŝtato, grupo aŭ persono iel ajn rajtas entrepreni ian ajn agadon aŭ plenumi ian ajn agon, kiu celus detrui kiun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinitaj.

53-a Universala Kongreso de Esperanto

MADRID, 3.—10. Augusto 1968

Sub la Alta Protektado de Ĉef-Ĝeneralo Franco, Ŝtatestro de Hispanujo Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando.

Dua Bulteno.

En februaro estas sendita al ĉiu aliĝinto la Dua Bulteno. En ĝi troviĝas, krom ĝeneralaj informoj, indikoj kaj mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo, Infana Kongreseto k.t.p.

Oratora Konkurso.

La temoj ĉijaraj estas jenaj: a) Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj (Art. 1 — Un. Dekl. Homaj Rajtoj); b) Egaleco de seksoj en la Un. Dekl. de Homaj Rajtoj; c) La fenomeno de «Florinfanoj». Alia temo decidota.

Ekskursoj.

Okazos tri samtempaj tuttagaj ekskursoj al Toledo, Segovia kaj «El Escorial». Detaloj en la Dua Bulteno.

Loĝiga Servo.

Por la kongresanoj estas rezervitaj lokoj en diverskategoriaj hoteloj. La prezoj varias de 9.— ned.gld. (en moderna studenta loĝejo) ĝis 40.— ned.gld. (en luksa hotelo). Detaloj en la Dua Bulteno.

Fervoja Rabato.

Kun la Dua Bulteno estas sendita al ĉiuj aliĝintoj loĝantaj en Europo speciala karto, per kiu ili ricevas la rajton ĝui 25 %-an rabaton je aĉeto de fervoja revenbileto al Madrid.

Statistiko (je 30/1 1968).

Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstr. 9, Belg. 24, Braz. 4, Brit. 59, Bulg. 23, Ĉeh. 11, Danl. 17, Finn. 11, Franc. 127, Germ. 42, Krek. 1, Hisp. 224, Hongkongo 2, Hung. 12, Isl. 2, Isr. 5, Ital. 42, Jap. 11, Jug. 59, Kan. 3, Meks. 2, Mon. 4, Ned. 40, Norv. 9, Nov-Zel. 1, Poll. 15, Port. 14, Sovet. 1, Sved. 24, Svis. 5, UAR 1, Urugv. 1, Usono 21. Entute 831 aliĝintoj el 35 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario.

Skandinaviana kongresvojaĝo 1968

53-a Universala Kongreso de Esperanto
3/8 MADRID 10/8

Provizora programo

Flugvojaĝo Kopenhago — Malaga —
Malaga — Madrid — Madrid —
Kopenhago

Sabato la 27-an de julio:

Firo de Kopenhago al Malaga, per aŭtobusoj al Torremolinos. 6-taga restado en dilitaj ĉambroj kun bano kaj duonpensiono (matenmanĝo kaj vespermanĝo) en hotelo «Tres Carabelas» (Tri karaveloj), plej luksa hotelo ĉe la konata marbordo «Costa del Sol».

Dum la restado tie okazos du ekskursoj, unu el ili al Granada kun la fama «leonekorto» en Alhambra.

Vendredon la 2-an de aŭgusto:

firo al Madrid. Per aŭtobusoj de la aerhaveno al hotelo «Goya» en la centro de Madrid ĉe la bela placo «Puerta del Sol». 8-taga restado en dilitaj ĉambroj kun bano kaj matenmanĝo.

Sabato la 10-an de aŭgusto:

firo de Madrid, alveno al Kopenhago saman tagon.

La flugoj okazos dum la tago.

Prezo por partopreno — ĉiuj flugoj, aŭtobusoj, 2 ekskursoj, hotelaj restadoj — por unu persono danaj kronoj 2.090,00. Geedza paro rabaton: por persono danaj kronoj 1.840,00. Por unulita ĉambro: aldono de d. kr. 170,00.

Kun rezervo pri eventualaj altiĝoj de prezoj kaj ŝanĝoj en flugvojaĝa horaro.

La vojaĝo okazas en kunlaboro kun Sveda Esperanto-Federacio kaj Kongresvojaĝa sekcio de CDEL.

Kune kun via vojaĝa ligo bonvolu sendi 100 n.kr. Tiun sumon oni kreditas al vi. Ĉiujn necesajn aliĝojn al la kongreso kaj al la kongresvojaĝo kaj monon bonvolu direkti al Turisma Servo de N.E.L., Box 942, Oslo I, aŭ rekte al Kirsten EK, Otto Ruges vei 66, Oslo 7, telf. 24 05 64.

ESPERANTISTOJ RENKONTIĜOS EN ROSTOCK (GDR)

La tradicia «Semajno de la Balta Maro» en Germana Demokratia Respubliko okazos ĉijare de la 7-a Julio ĝis la 14-a. Samtempe la tradichava Hansa-urbo *Rostock* solenos sian 750 jaran jubileon. Skandinaviaj Esperantistoj, kiuj ŝatus viziti Rostock dum tiu tempo per speciale favoraj vojaĝkondiĉoj ricevos informojn ĉe

Den Norske Komitéen for Østersjøuka,
Postboks 51 57, Telef. 46 29 90.

La Rostock-a Esperanto-Grupo petas ĉiujn (ankaŭ eksterskandinaviajn) esperantistojn, kiuj partoprenos la festaranĝojn, kontakti kun Esperanto-Grupo-Kulturbund-25, Rostock, Kröpelinstr. 25, Germ. Dem. Resp.

Norvega Kroniko

Red.: **KARSTEN LANGSHOLT**

Klubo Esperantista en Oslo.

15/1. 68. La prez. John Berggren deziras al ni ĉiuj bonan novan jaron kaj bonvenon al la kunveno.

Li informis ke la Esperanto-ekspozicio en la Hispana Ŝtata Turistoficejo en Stortingsgt. malfermiĝos baldaŭ.

Kiel kutime je la komenco de nova laborsezono la prez. hodiaŭ skizis la labortaskojn, dirante interalie ke la unua labortasko estas disvastigi la konon pri Esperanto inter la publiko — aktiveco en ĉiu signifo de la vorto. Se ni havus 100 aktivulojn en la klubo, ni povus fari multan propagandon. Ni bezonas pliajn membrojn, kaj plian partoprenadon en la klublaboro kaj ĉeestadon en la kunvenoj.

Nia vicprezidanto kaj propagandestro Thor Magnus Carlsen parolis «lomete pri kafo». Li rakontis pri la origino, historio kaj disvastigo de tiu tre ŝatata frukto, pri la kvanto kiun la diversaj nacioj konsumas, pri la diversaj kvalitoj kaj uzeblecoj kiel trinkaĵo, kafo kun glaciĉo, en kukoj k.t.p. Li ankaŭ disdonis specimenojn al ĉiuj ĉees-

tantoj, kelkajn saketojn por senpaga lotumado, kaj donacis kafon por trinki dum la kafopaŭzo.

Kirsten Ek, kiu estras la Turisman Servon, donis la lastajn novaĵojn pri la kongresvojaĝo. La danaj kaj svedaj Esp.-asocioj planas aranĝi komunan skandinavan flugvojaĝon al Hispanujo, kiu inkluzivas restadon en Torremolinos kaj Madrid.

Raportis Harða Danielsen.

Korespondu!

Mi tre deziras korespondi kun norvegaj geesperantistoj. Moacyr Vitale, Rua Joaquim Nabuco, 21, *Salto*, Estado de S. Paulo, Brazilo.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi kovertojn de razklinoj. Mi havas 3 000 ekzemplerojn, sed nenien el Norvegujo! Jiri Rosypal, *Brno-Sobesice*, Ĉeĥoslovakujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S
(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo.